

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nепveustraаt 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177
Peningmeester FLE, Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Libro-Servo FLE, Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

Letero el evolu-regiono al la homoj en la okcidento

La ĉi-tieaj gazetoj de temp' al tempo koncize mencias pri la penado de la loĝantoj en landoj kun ekonomie alta nivelo por la bono de ties malpli favor-sortaj gefratoj.

Tiuj komunikoj nepre ne estas grand-nombraj kaj mi tuj aldonu, ke apenaŭ estas parolo pri iuj landoj, apartenantaj al tiu mondo de malsato. Tiuj landoj tamen volas esti si mem; ili ne volas esti nomitaj inter tiuj, kiujn ili titolas: „La landoj almozpetantaj”. Ili konsentas, ke iuj grupoj el la loĝantaro ricevu sub-vencion, sed aliflanke ili kontraŭas la propagandon ŝajnigantan ilin malriĉuloj. Kaj tio ja okazas sub la preteksto, ke ili ankoraŭ ne havas altgradan kleron, ne posedas nub-skrapantojn aŭ ke la sekreto de la atomfendado estas tie ne konata. Iuj landoj, do, ne pretas preni bonŝancon kaj teknikon por civilizo kaj kulturo.

Nenia abundo

Unue mi postulas klaran difinon pri tio, kion vi „evoluintaj popoloj” de la okcidento komprenas sub „evolulandoj”.

Se vi juĝas nian mankon je evoluo sur bazo de la salajro, ni nepre ne pretendas egalecon de via salajro-koverta kaj nia. Kompreneble la prezoj por la unue necesaj porvivaĵoj havas valoron nur en komparo kun la perlaboraĵo; sed vere estas ankaŭ, ke la vastega plimulto de la loĝantaro ĉi-regiona ne konas aliajn nutraĵojn krom la nemankipovaj kaj ke kiu ajn t.n. „nenecesa aĉeto” al ili estas ne-ebla.

Ni nepre ne ĉiudimane manĝas kokinojn kaj inter niaj civitanoj ni konas nur malmulte da kiuj povus permesi al si feriadon eksterlandan.

Se vi kvalifikas landon evoluregionon pro ties pli aŭ malpli malalta nivelo de la produktiloj, ni devas konfesi, ke ofte ni perlaboras ege malmulte, ĉar ni produktas malmulton kaj ni produktas malmulton pro tio ke ni produktas fuŝe.

Sed ĉu tio estas ĉiam misfaro nia? Ĉu ankaŭ ĉe via flanko eble estas kulpo rilate al la stagno de nia produktado?


de patro Gerardo Protain,
fondinto de la unua
Emmaus-komunumo en Peruo

Ofte, por ne ĝeni vian propran enlandan merkaton, vi mem fiksas la limon de nia produktokvanto, dum vi mem staras preta ŝuti produktoplusojn en niajn landojn.

Ĉe tio vi ne lasas al ni la liberon liveri interŝange laŭ nia deziro, krom nur esceptokaze se via pagobalanco ne trafos pro tio en malekvilibron.

Viaj reĝimoj kaj registaroj metis ĉiam

siajn interesojn super niaj. Por paroli eĉ pli klare: vi funkciigis artefaritan konkurencon, kiu unue ĝenis niajn etproduktistojn kaj poste ruinigis ilin — ekzemple pri la kafo en la perua Montana el kio fine ĉiam profitis la grand-aĉetanto, kiu fiksas la prezojn konsiderante la troproduktadon. Io tia okazis je la koton- kaj kupromerkatoj. Do ne estas kulpo nur nia



~~~~~  
*Simbola bildo pri la infano, kiu en siaj unuaj vivojaroj estu helpata, por poste memstare fronti la vivon.*

*(Kliŝon afable pruntedonis NVV)*

ke niaj labormetodoj estas malmodernaj. Viaj traktoroj ekzemple, kiuj senpene kaj kun kreditfacilaĵoj estas vendataj en la landoj ilin fabrikantaj, ĉe ni kostas la duoblon. Krom tio la aĉeto estas nur revimago ĉe la eposedantoj de tro-ekspluatataj kaj dise situantaj kampoj, ne sufiĉe fekundaj por esti interesaj por la grandaj ekspluatistoj.

Kiel vi klarigus, popoloj okcidentaj, tiel bele paroladantaj pri amo al la proksimumo, ke la prezo de veturilo estas la duoblo de tiu en via hejma lando, dum — laŭ viaj propraj statistikoj — nia meza enspezo estas malpli ol kvinono de via.

La hispana vino superakvalita en iuj jaroj vendiĝis je malpli ol la ordinara franca vino. Ĉu tio ne estas ekspluatado de la malriĉo? Kiuj igas leviĝi aŭ malleviĝi la mondmerkatajn prezojn? Anonimaj kaj internaciaj organizoj en kiuj membras ankaŭ civitanoj el la regionoj de malsato. Ĉar „la mondo de la mono” estas ĉie, kaj ĉe vi kaj ĉe ni. La Maharadja (Granda Reĝo, trad.) el Hindio, la riĉa japana industriisto, la grava argentina brutbredisto, la grandbienulo el Sud-Ameriko, hejmas en la „zono de malsato” kaj „la landoj de l'nescio”.

#### Ankoraŭ ni havas kuraĝon

La grandaj organizoj internaciaj, kiuj kapablas laŭ siaj bezonoj levi aŭ mallevi la prezojn, rifuzi aŭ aprobi produkton aŭ inventon, kiuj regas la fluktuadon de la kurzoj kaj la tutmondajn prezojn de la unu necesaj nutraĵoj, ankaŭ ĉe ni havas siajn filiojn kaj stablojn. Kaj do ankaŭ en Peruo ekzistas samlandanoj, peruanoj, civitanoj de lando kie regas la mizero, kiuj vendis karbon interŝanĝe por produktoj el la okcidento kontraŭ prezoj, kiuj kondamnas la laboristojn konsenti pri salajro de malsato.

Kaj en Peruo la vastegaj kuprominejoj de Toguepala estas ekspluatataj malgraŭ la gigantaj investadoj pro tio postulataj, dum la etaj minposedantoj devis fermi siajn ŝaktojn kaj maldungi siajn laboristojn pro la limigo de l'produktado preskribita de la monda merkato.

Tiuj limigoj rezultigis gravan senlaborecon. Tamen iuj el vi kuraĝas publikigi, ke al la laboristaro en la evolu-landoj mankas kuraĝo; laboristoj kiuj pretas fosi minejojn situantajn je alto 5000-metra!

Vi parolas pri helpo al ni kaj ni scias, ke via kunsentado kun la malsatantoj estas sincera. Sed la helpo kiun doni al ni vi deziras, unualoke devus esti helpo per kiun ni povos labori, do, produkti kaj vendi. Neniam ni estos findirintaj: ni, „evolulandoj”, estas malriĉaj ĉar ni estas la viktimoj de la grandaj internaciaj intereso kaj de ties administrantoj kaj defendantoj.

Se Kubo al la meza sud-amerikano aperas kiel ia grandegulo, tion kaŭzas ne la fakto ke Fidel Kastro estas komunisto — ja multaj bedaŭras tion — sed estas pro tio, ke li estas la ĉampiono de la ekonomia revolucio kontraŭ la mallumaj potencoj frakasantaj la homon kaj ŝirantan ties indon.

Riĉaĵojn? Da ili ni posedas abundon!

Per bonaj organizado kaj planado Peruo povas nutri loĝantaron el pli ol 50 milionoj da homoj: la praarbaro ankoraŭ ne ekspluatata entenas riĉaĵojn nesupozitajn. Mineraloj tiom abundegas, ke ni povos fermi plimulton el la minejoj por ekspluati nur la plej profitodonajn.

Ni havas karbon, oleon kaj feron. Ni posedas valojn taŭgajn por establi industrion kaj por eksporto de elektro-energio.

Ni manĝas fruktojn okcidentajn kaj povos vendi orientajn. Donu al niaj kampoj irigacion kaj ili liveros rikoltojn kiel en la Lando Promesita.

Kaj ne forgesu vi, ke funkcias niaj universitatoj kaj ke pro la ironio de l'fatalo kaj de la ekonomiaj cirkonstancoj niaj inĝenieroj, profesoroj kaj esploristoj praktikadas sian profesion aliloke ol ĉe ni.

Heroo, super-homo oni devus esti, por ne implikiĝi en la maŝaro de la mono. Urbojn posedas ni samproporcie kiel vi. Sed tute normale estas, ke homoj dum sep jaroj sin dediĉintaj al la studado, hezitas ekloĝi en la montaro, kie estas necerte ke ili povos panakiri por si kaj siaj familioj. Mi jam diris: donu al niaj viroj bonajn salajron kaj nutron kaj ili estos same valoraj kiel viaj.

Mono? Jes, je tio ni havas mankon. Tiomgrade ĝi mankas ĉe ni, ke niaj registaroj, iom post iom, devis meti la produktadon en manojn fremdajn, ĉar mem ili ne povas ekspluati la naturan riĉon de la lando. Certe oni komprenos, ke jam baldaŭ ĉi ekspluatado fariĝis ne disvolviĝo de la lando, sed fonto de profito por la eksterlandaj trustoj, al kiuj aliĝis plej rapide niaj grandbienuloj kaj industriistoj. Preskaŭ neniu el ili pensis pri la establo de ia „komuna merkato” en la servo de ĉiuj. Plimulto el ili — ĉu pro neceso, ĉu pro egoismo, ĉu kun bedaŭro — partoprenis en la nova koloniismo, kiu ruinigas la etproduktantojn kaj kreas mizeron kaj malsaton.

#### Ia narkotaĵo

Certe vi nun komprenas, pro kio viaj kampanjoj de bonfarado, kiuj estas laŭdindaj, laŭleĝaj kaj necesaj, fakte estas nur ia narkotaĵo, dolormildiga rimedo, kiu kontinuas nian suferadon. Senefika ĝi estos, se vi ne direktos vian propagandon al funda reformo de la ekonomiaj sistemoj, por ke tiuj fariĝu fratecaj kaj justaj kaj ne plu ekskluzive celantaj la maksimuman profiton de areto da homoj.

Ni ne povos evolui — kaj nepre ne prosperi — tiom longe kiom vi obstinos defendi viajn egoismajn interesojn

Iuj limimpostoj nepre estas ne malaltigitaj por celoj bonfaraj; oni aspiras pri grandajn vendokvantojn. La „komunuma merkato” estiĝis ne el „amo al la proksimumo”, sed el la neceso povi fronti la kreskantan konkurencon.

Niajn landojn vi konsideras klientoj kaj nin vi manipulas kiel merkaton por ĉio de vi fabrikita kaj produktita, de la unue necesaj nutraĵoj ĝis la luksaj artikloj, ĉe vi hejme apenaŭ vendeblaj, kaj eĉ viaj filmoj, pri kiuj vi scias, ke ili donos dolĉan profiton, ĉar ili incitas la febran fantazion de subnutritaj popoloj. La valoron de individuaj kampanjoj de bonfarado ni ne subtaksas. Se ili estas entreprenataj pro pura homamo, por humile doni fratan helpon, ni ne rifuzos akcepti.

Sed ke la Okcidento kiel tia proponas savi nin el la mizero, jen kio ofendas nin. El la „regionoj de malsato” la Okcidento faras fontojn de profito. La gajno akirita de ĝi per nia devigita aĉetado vaste superas la sumojn de ĝi investitajn por nia evoluo.

## J. W. MINKE †

Kun malgajaj pensoj ni sekvas la ĉerkon al la Kremaciejo Westerveld: denove nia aktivularo maldensiĝis, ĉi foje por ĉiam forlasis nin k-do J. W. Minke en la aĝo de 70-jaroj. Lia subita morto, okazinta la 16an de aprilo, profunde impresis nin.

K-do Minke lernis Esperanton en 1926 kaj estis unu el la fondintoj de la dua amsterdama sekcio de FLE. Baldaŭ li montriĝis bonega gvidanto de kursoj kaj grupvesperoj.

De 1951 ĝis 1958 li partoprenis en la redaktado de nia studgazeto „La Progreso” kaj poste transiris al la redakcio de la „Lingva Rubriko por La Progresanto” en Laborista Esperantisto.

Dum multaj jaroj lia sanstato — li suferis bronkiton — ne permesis al li publike paroladi, sed li riĉe kompensis tion per sia skriba laboro: multan sukceson li rikoltis per siaj rubrikoj: „De komencanto al progresanto”. „Kiel ni diru tion?”, „Malfermu la buŝon en Esperanto!” kaj lia lasta: „Lernu ludante, ludu lernante”. Lia ŝatokupo estis astronomio, pri kio atestas liaj legindaj artikoloj en „Zamenhofa Gazeto” — la organo de la Amsterdama Distrikto de FLE — kaj en „Tripepe”, la iama organo de la dua, tria kaj dekunua sekcioj en la ĉefurbo.

Minke ne vivis vane kaj postlasis al ni bonan ekzemplon de aktiveco por bela idealo.

Al liaj edzino kaj gefiloj ni deziras la forton necesan por venki ĉi tiun malgajan vivperiodon.

La Asocia Estraro de FLE

La Redakcia Komitato de Lingva Rubriko

Vi pavas per faroj pri amo al la proksimumo, sed ne parolas pri la miloj da manieroj prenaĉi niajn enspezojn kaj niajn avarcajn salajrojn. Vi insistas por karito kaj almozoj kaj malgraŭ tio eĉ la prezoj por geedziĝa soleno kaj enterigo estas aferoj riĉulaj.

La malsatuloj, pri kiuj vi parolas tiom karese, devas pagi minimume f 100,— por ke ili povu mortii. Por la plej malriĉaj ĉitieaj tio egalas al unu-monata laborado. Eĉ la lernejoj fariĝas objektoj de gajno. Tiuj inter ni, kiuj estas vere subnutritaj, ofte ne vizitas ilin. En niaj antaŭ-urboj kaj domaĉaj kvartaloj lernejoj por daŭriga instruado ne ekzistas. Malriĉulo ja ne bezonas iri lernejon!

Koncerne la almozojn: tiuj ofte atingas nin sub la formo de plus-kvantoj kiujn ni akceptas, sed kiujn ni komparas kun la luksaĵoj de vi proponitaj al la plej favorataj inter ni.

#### La kaŭzoj de la malriĉo

Via peko, nacioj evoluintaj, estas ne ke vi kortuŝiĝas pro la infanoj mortintaj pro malsato, kiujn oni prenkoklektas de la stratoj en Bombay. Estas la fakto, ke vi ne ŝanĝas vian ĝeneralan ekonomion kaj ke nin, etajn landojn, vi ne partoprenigas en la disvolvado de la teraj riĉaĵoj. Estas necese kuri helpe al la plej malesperaj. Estas neeviteble, entrepreni laborojn longedaŭrajn por tiel preventi la mizeron. Estas urĝege necese, influi la ekonomian, financan kaj industrian merkatojn por atingi la kernon de la problemoj, la bazon de la malriĉo.

Ĉiu alia formo de subteno okazu inter la

# LINGVA RUBRIKO

## POR LA PROGRESANTO

Redakcia komitato:  
E. BURGLER, F. FAULHABER,  
H. KUIJT, J. PH. PUNT,  
C. P. WESTERVELD  
Redakcia adreso: E. BURGLER,  
Sportstraat 62, Amsterdam-Z.  
majo 1967

### LA AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO REKOMENDAS

(daŭrigo)

Alarmiga laŭ nia opinio estas la frazo en n-ro 3 de Interlingvistika Informa Servo: „... Kalocsay en sia nova traduko de Reĝo Lear ne plu uzas 'mal'-vortojn”. La verkinto de la artikolo (d-ro Werner Bormann) daŭrigas: „li (t.s. Kalocsay) nur kunmarŝas en la ĝenerala evoluo de skemeco al naturalismo, la lingvistoj bonvenigas tiun evoluon. Sed la sociologoj devas averti pro la kresko de la lernotaĵo. La internacia lingvo ne nur servos al eŭropanoj, al kiuj la naturalismo ĝenerale ne estas tro ĝena. Sed ĝin uzu homoj de ĉiuj gepatraj lingvoj, ne nur pasive, sed aktive. Tiukaze ĝi prefere estu pli skemeca kiel Esperanto. Tial ni devas esti tre retenemaj kontraŭ tiu evoluo kaj ne senpripense fordoni gravan avantaĝon.”

En tiu stato de la „evoluo” silento laŭ nia opinio ne estus plu tolerebla. Kaj ĉar la Akademio de Esperanto daŭre silentas, nia Instituto decidis ekagi memstare. Konforme al siaj statutaj taskoj ĝi de nun de tempo al tempo publikigos laŭ la fundamentaj reguloj de la internacia lingvo Esperanto „rekomendojn” pri la uzo aŭ neuzo de esprimoj.

Kaj ĉar nia lingvo estas kaj devas esti la sama por ĉiuj esperantistoj, ni ne povos limigi niajn rekomendojn al la aŭstria samideanoj (kiujn konsili estas la ĉefa tasko de nia instituto), sed ni sendos tiujn rekomendojn ankaŭ al la koncernaj institutoj, redakcioj ktp. en aliaj landoj por informo kaj kun la peto publikigi tiujn rekomendojn ankaŭ en iliaj agosferoj. La Aŭstria Esperanto-Instituto cetere decidis, en diskutindaj kazoj, antaŭ la publikigo de rekomendo interkonsiliĝi kun frataj institucioj por trovi komunan solvon.

Hodiaŭ — por doni praktikan regulon, kiun oni certe ne bezonas diskuti antaŭe — ni volas nur rekomendi:

Rekomendo n-ro 1:

Praktikante la internacian lingvon Esperanto ni uzu prefere la vortojn fundamentajn kaj oficialajn kaj nur se neniu el ili sufiĉas, ni uzu alian esprimon.

Rekomendo no. 2:

La facila lernebleco de Esperanto dependas laŭ la intenco de ĝia aŭtoro de la uzado de relative malmultaj radikoj kaj de sistema uzado de afiksoj, per kiuj en kunmeto kun tiuj radikoj povas esti evoluata necese ampleksa vortaro.

Unu el la plej gravaj afiksoj estas la prefikso *mal*, kiu pro tio estas instruata jam en la unua aŭ dua leciono de ĉiu lernolibro de Esperanto. Nun jam de kelka tempo reformemuloj anstataŭigas la kunmetitajn vortojn, kiel malgranda, mallonga, malvarma ktp. per novaj radikoj kiel mikra, kurta, kolda...

Laŭ opinio de kelkaj Akademianoj kaj esperantistaj verkistoj la prefikso *mal* eĉ povas esti ligata ankaŭ al la novaj radikoj, per kio ekestas la cirklo pleonasma:

longa — mallonga — kurta — malkurta — longa...

Tio kontraŭas la esencon kaj taskon de la internacia lingvo Esperanto. Tial la Aŭstria Esperanto-Instituto rekomendas: Se jam ekzistas esperantlingva radiko bonvolu formi la rektan kontraŭon de ĝi uzante tiun radikon kaj metante antaŭ ĝi la prefikson *mal*, sed evitu la anstataŭigon de tiuj kunmetitaj vortoj per novaj radikoj.

Tio kompreneble koncernas ankaŭ ĉiujn aliajn radikvortojn kaj afiksojn de Esperanto.

Al la ŝatataj esperantlingvaj institucioj! Ni kore petas vian opinion pri la supraj rekomendoj.

Kun samideanaj salutoj por la  
AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO  
La direktoro.

En januaro 1967.

Ni publikigas ĉi tiun rekomendon en *sia tuto*. Volonte ni aŭdos vian opinion, por ke ni povu sendi nian respondon al AEI. Tiu ĉi laŭdinda laboro povos sukcesi nur per komuna bonvolo.

## La arto de la tradukado

Jam ofte ni traktis la problemon de la traduko. Tio estas tutnatura, ĉar ni ofte devas traduki kaj interpreti el naciaj lingvoj en Esperanton. Ĉiu, kiu komencas lerni Esperanton, devas unue — longan tempon — konstante traduki, ĝis kiam li regas Esperanton, la „fremdan” lingvon. Do ĉio rilate al tradukado ne povas ne interesi la esperantiston.

La numero II/64 de la revuo Unio, la organo de la Literarische Union e.V. (Saarbrücken 3, Kaiserstr. 15), unuiĝo, en kiu poetoj kaj aŭtoroj el diversaj landoj, inter ili eminentaj, kuniĝis, estas dediĉita al la problemoj de la tradukado. La aŭtoro de la (germanlingva) ĉefa artikolo pri la arto de la tradukado estas prof. d-ro Ervino Pocar, kiu prelegis pri la temo jam en diversaj germanaj universitatoj kaj presigis ĝin ankaŭ en la revuo de la Goethe-instituto „Deutschunterricht für Ausländer” (instruado de eksterlandanoj en la germana lingvo). Pro tio ke la aŭtoro estas italo, kiu studis en Vieno, liaj diraĵoj koncernas precipe la rilatojn inter la germana kaj la itala. El siaj pripensadoj li ekskluzivas la ĉiutagan, la komercan kaj la oficialan tradukojn. Nur la tradukado de literaturaj artaĵoj interesas lin. Li citas mutajn modelojn de tradukaĵoj gravaj el literatura vidpunkto, ekz. de la Biblio. El ĝi li mencias la konatan vorton (latinan): Ex abundantia cordis os loquitur, kiu laŭvorte tradukate signifas: El la abundo de la koro la buŝo parolas, sed kiun Luther tradukis en maniero poeta kaj same pli bone komprenebla al la simpla homo: Wes das Herz voll ist, des geht der Mund über (kies koro estas plena, el ties buŝo fluas la vortoj). Krome la aŭtoro okupiĝas pri netradukeblaj konceptoj kaj objektoj, kiuj ne ekzistas en la imagado aŭ en la lando de la aliaj kaj kiuj tial devas esti ĉirkaŭskribitaj. Fine la aŭtoro demonstras ekzemplojn intere-

sajn de eraraj tradukoj. Principe li postulas laŭ teksto esperantigita: „La tradukanto ne devas meti vorton apud vorto en vicoj laŭ la teksto, sed li devas kompreni kaj interpreti ĝin, pro tio ĉiu bona tradukaĵo estas komento al la origina teksto. Estas kazoj ke la teksto estas neklara kaj malfacile komprenebla, sed la traduko ne devas esti neklara, tial la tradukanto devas klopodi ĝuste interpreti kaj klare esprimi la neklaran.” Ni timas ke tia rekomendo mem ne estas tro klara. Li daŭrigas ke necesas traduki ne nur por la animo, sed ankaŭ por la orelo. La orelo. La lingvo estas ankaŭ muziko kaj melodio — kion ni tute konsentas, sed li konkludas el tio, ke la tradukanto devas adapti sin ankaŭ en la sono de la traduka lingvo al la sono de la origina teksto.

Certe la postuloj de Pocar ne ĉiam estas plenumebaj nek sekvindaj en detaloj. Se estas la intenco krei en la tradukaĵo novan poetan verkon, fakte necesas havi multe da libereco. Sed ĝenerale tio ne estas la tasko de la tradukanto, nek ĉiam eblas transigi la melodion de iu lingvo en alian, kiu laŭ sia strukturo povas esti tute malsama.

Je la fino de la kajero, por rememoro al la antaŭnelonge mortinta germana poeto Werner Bergengruen, poemo de tiu estas tradukita de franco en la francan, de svedino en la svedan kaj de finno en la finnan. Evidente estas intencite atingi ke franco, svedo aŭ finno legante tiun poemon en sia lingvo sentas la samon, kion sentas la germano legante ĝin en la germana. Ĉu estas tiel, neniu povas diri kun certeco. Ĉar la objekto, senco aŭ enhavo de poemo plejofte originas en la mentaleco de tiu, en kies gepatra lingvo la poemo estas verkita, kaj estas dube, kelkfoje eĉ neverŝajne ke la objekto ludas la saman rolon ĉe alilingvulo. Tial ni opinias ke la tradukado de poemoj povas esti arto, sed ĉiam estas la risko ke ĝi estas artefaritaĵo.

Pro tiu kaŭzo ni ankaŭ estas skeptikaj rilate al la plano de la Literatura Unio aranĝi ĉenan tradukadon de poemoj. La unio volas prezenti diversajn poemojn en diversaj lingvoj kaj starigis por tio konkursan ordon. Ekzemple estas la intenco igi traduki italan poemon de franco en la francan, la francigitan tekston de svedo en la svedan, tiun de ĉeĥo en la ĉeĥan, tiun de germano en la germanan kaj la lastan tradukon de italo ree en la italan, kaj neniu el la intertradukantoj konos la originalan tekston nek ties aŭtoron. Fine la pra-originala poemo estos komparata kun la nov-originala.

Ni scias ke tia eksperimento estis farita jam unufoje helpe de Esperanto. Sed en tio temis ne pri poezio, sed pri proza teksto, kaj ĉiam inter du nacilingvaj tradukoj Esperanto estis intermetita. Tio estis por pruvi ke la precizeco de la traduko ne malpliigis pere de Esperanto. Do la eksperimento havis gravan celon kaj estigis valorajn ekkonojn pri la aplikeblo de Esperanto. Kontraste al tiu aranĝo ni inklinas opinii ke ĉena tradukado de nacilingvaj poemoj estas pli sporto de literaturista maniero ol farado utila aŭ respektinda el literatura vidpunkto. Eĉ la iniciatintoj nomis sian planon nur „ĉarma provo”. Pro tio ni ankaŭ volas, kvankam ni ne rekomendas realigi la planon, tamen ne anticipi negativan juĝon, antaŭ ol ni estos vidintaj la rezulton.

El: *Interlingvistika Informa Servo*  
marto '65.



Lastmomente ni ricevis sciigon pri la morto de nia ŝatata kunlaboranto. Ni petas momenton da silento je lia honoro. En nia junia numero la rubriko denove aperos.

## Ĉu Esperanto vere vivas ?

J. Ph. Punt

### OPGAVE 4

*Zij zien er wel wat in*

Heel veel mensen beschouwen Esperanto nog steeds als een aangenaam tijdverdrijf, een ongevaarlijke liefhebberij en de esperantisten als jagers op een onhaalbare zaak, als utopisten.

Op verschillende punten zijn zij echter minder realistisch dan de mensen die zij kritiseren. Natuurlijk wordt de tijd besteed aan het leren van Esperanto aangenaam doorgebracht, maar dat geldt ook voor andere dingen. Het kan ook best zijn — en zou men zich daarvoor schamen? — dat een esperantist Esperanto als een liefhebberij beschouwt. Maar datzelfde Esperanto, alleen al uit economisch standpunt bekeken, staat beslist boven andere talen. Met deze ene hulptaal kan de beoefenaar de hele wereld bereiken. Niet alzo met de nationale talen.

Een van de gebieden waar men sterk wordt gehinderd door de taalverscheidenheid is de handel en alles wat daarmee samenhangt. In alle publikaties over de hele wereld kan men lezen, dat het nodig is de export te vergroten. Om dat te doen is het nodig, een kwaliteitsprodukt te leveren tegen een aantrekkelijke prijs. Maar behalve dat — en misschien wel allereerst — moet het publiek kennismaken met die artikelen en/of waren in beeld en woord; dit laatste natuurlijk in de betreffende landstaal. Dat is een dure geschiedenis en kan niet nalaten de prijs te beïnvloeden.

Als de betreffende ondernemingen reclame konden maken in een taal, zouden zij de kosten van de reclame belangrijk kunnen drukken.

(daŭrigota)

## Antaŭ la elementa ekzameno

C. P. Westerveld

### OPGAVE 5.

*Zo werkt een veilingklok*

De groente- en fruitveilingen zijn bijna onvoorstelbaar zonder veilingklok en de tientallen kopers in de banken tegenover de klok.

De klok bestaat uit een heel grote wijzerplaat met slechts één wijzer. Aan de rand van de plaat staan getallen, die de prijzen aangeven van de te kopen produkten. Om het centrum staan nummers.

Wanneer het apparaat in werking komt, beweegt het uiteinde van de wijzer zich langs de getallen. Plotseling wordt een nummer in het midden verlicht en dadelijk staat de wijzer stil.

Het lichtende nummer behoort aan de koper, die het eerst op het knopje voor hem op de bank heeft gedrukt. De wijzer geeft de prijs aan waarvoor hij de aangeboden partij heeft gekocht.

De administrateur noteert koper, partij en prijs, de betaling volgt na afloop van de veiling.

De veilingmeester kondigt de volgende partij aan. Hij trapt op een pedaal en de wijzer gaat terug naar nul.

Gespannen gevolgd door vele ogen, beweegt de wijzer zich dan weer langs de schaal. Van te voren heeft men een minimumprijs vastgesteld. Draait de wijzer tot die onder deze prijs, dan zijn de waren „doorgedraaid”. Zij worden vernietigd, naar de fabrieken gezonden of als veevoer gebruikt.

Het centraal bureau stelt voor, de klok niet meer te gebruiken voor massa-produkten, zoals tomaten en komkommers. Men wil de prijs vaststellen, opdat de tuinders meer geld ontvangen en de concurrentie tussen de eksporteurs verminderde.



### VERTALING VAN OPGAVE 4

1. Ununura gazeto estus ankaŭ multe pli praktika, pensas ĉiu portisto.
2. Nun li devas zorgi atenti la domnumerojn.
3. Je numero dudek ok iu sinjoro deziras legi socialisman gazeton, je numero tridek romkatolikan gazeton kaj numero tridek du deziras liberalan ĵurnalon.
4. Tio ja povas okazi multe pli praktike.
5. Ĉiuj homoj manĝas ĉiujn tagojn malsaman nutraĵon.
6. Je numero kvardek ili manĝas hodiaŭ pizan supon, je kvardek du makaronion, je kvardek kvar fazelojn.
7. Se ĉiu konformiĝus al de la registaro ordonita menuo de la tago, kun elekto eventuale el kvin menuoj, tiam ĉio povus esti preparata pli malmultekoste kaj praktike en centraj kuirejoj.
8. Sed ne, ni ne pensas pri tio.
9. Ni estas rimarkinde kontentaj pri la privata poto, kvankam nur unu familiano, la mastrumistino, decidas pri la enhavo.
10. Mi nur volis diri, ni jam estis tiel saĝaj ne esti tro praktikemaj. Ni daŭrigu tiel.

## Esploru vian scion!

H. Kujt

### OPGAVE 5

*Kasteloj en aero*

Iun vesperon mi sidis ĉe svisaj amikoj en Londono, kiam mi aŭdis rimarkon, kiu skuis min el mia memkontento. La vortoj batadis en mia cerbo, kvankam ili estis diritaj tute pretere en la kadro de ĝenerala konversacio.

Mi jam ne memoras, pri kio temis, kiam iu sinjorino subite rimarkis: „Se viro ne estas sur la vojo al materiala prospero je la aĝo de tridek, liaj ŝancoj ne estas grandaj.”

Tiu diro forte enpenetris mian animon. Mi komencis revizii mian nunan pozicion. Ĉu mi, jam pli ol tridekjara, estas nun sur tiu vojo al sukceso? Nu, la laboro estas simpatia, mi statas bone kaj mi havas grupon da laborantoj, pri kiuj mi disponas kvazaŭ estro.

Vere — sed mi mem diferencas de miaj „dungitoj” nur laŭ grado.

Ĉar ankaŭ mi estas dungito: la ĉefdungito, certe, sed tamen dungito. Mi ne povos jam plialtigi mian pozicion. Do kio staras antaŭ mi? Kion la estonteco al mi proponos? Jarojn post jaroj da salajra laborado en foiroj? Ne malbona vivo, ne malbona salajro, sed kien ĝi kondukos? Nenien. Se oni konsiderus ĉion: ĉu gravas, ke mi estas rekonata kiel bona eksponvendisto, ke homoj laŭdas min?

Sed kiam mia vervo ne eltenos, mia energio komencos manki kaj la neregula vivado komencos tedi — do kion mi faros tiam?

### VERTALING VAN OPGAVE 4.

Kiu nederlandano ne konas la strion el monteca tero, kreita de la naturo kaj nomita „la dunoj”, kiu tiel efikplena ŝirmas la malaltan landon, kiu situas malantaŭ ĝi, kontraŭ la maro.

Antaŭ miloj da jaroj ĉi tiu strio aperis el la maro kaj fariĝis pro sovaĝaj ventoj kaj fortaj akvotorentoj, malebena, kelkloke profunde fendiginta altaĵo.

Kie la ŝirmanta strio ne estas, tie ĉiam minacas danĝero; ĉiufoje denove evidentiĝis ke akvorenuloj konstruitaj de homoj ne kapablas garantii sufiĉe da sendanĝereco. Por tio estas nepre necese ke la dunstrio estas ĉirkaŭita per granda zorgo.

Oni plantas tie amofilon, herbospecon kies radikoj kreskas profunde en la tero por kontraŭstari disblovojn el sablo. Facile difekteblaj partoj estas ĉirkaŭitaj de ŝirmiloj por malhelpi subfosojn kaj ĉiajn difektaĵojn de homoj kaj veturiloj.

Grandaj partoj estas gardataj, ankaŭ por ekzameni la obeadon de fummalpermeso en surkreskitaj terenoj. La tuto estas sub kontrolo de speciala servo.

Ĉi tiu landstrio estas por la loĝantoj en Nederlando de netaksebla valoro, ĝi ĉiuokaze indas la grandan zorgon kiun oni donas al konservado kaj gardado.

## ESPERANTA MOZAIKO

de F. Faulhaber donas respondon al multaj viaj demandoj. Aĉetu ĝin ĉe nia Libroservo, kaj ĉefe: trastudu ĝin.

Toelating van bezitters van N-akten en van de akte als hoofdleidster bij het kleuteronderwijs tot de examens voor de lagere akten.

Tot dusverre geldt als eis voor toelating tot de examens voor de lagere akten lichamelijke oefening, Franse taal, Duitse taal, Engelse taal, Spaanse taal, Friese taal, Esperanto, wiskunde, handelskennis, handenarbeid, landbouwkunde en tuinbouwkunde het bezit van de akte van bekwaamheid als onderwijzer.

Het ligt in de bedoeling na de inwerking-treding van de Overgangswet W.V.O. met toepassing van artikel 116, tweede lid, van die wet ook de bezitters van de Nijverheids-sonderwijsakten (N-akten), die tevens in het bezit zijn van het pedagogisch getuig-schrift voor het nijverheids-sonderwijs en de bezitters van de akte van bekwaamheid als hoofdleidster bij het kleuteronderwijs toe te laten tot de examens voor de lagere akten.

De bezitters van de bovenbedoelde akten zullen voor het eerst in 1969 aan de examens voor de lagere akten kunnen deelnemen.

Ten aanzien van andere bewijzen van bekwaamheid zal desgevraagd te dezer zake incidenteel worden beslist.

Opleidingen voor de examens voor deze akten worden o.m. gegeven aan de kweek-scholen voor onderwijzers(essen).

Eventuele gegadigden kunnen zich voor inlichtingen omtrent deze opleidingen wenden tot de directeuren van de kweek-scholen.

De kandidaten wordt erop gewezen, dat de Regeling bevordering studiezin onderwijzers niet op hen van toepassing is. Bij slagen voor een der akten lichamelijke oefening, Franse taal, Engelse taal, wiskunde en handelskennis komen zij ook niet in aanmerking voor een bonus op grond van de zgn. Bonus-K.B.

(Persbulletin no. 1764, d.d. 16 maart 1967, samengesteld door de Voorlichtingsdienst van het Ministerie van Onderwijs en Wetenschappen.)

Letermonaton en majo, okaze de kursfino organizas Esperanto-rondeto en Šumperk. Certa respondo. Ĉiu ricevos broŝuron pri montaro Jeseník kaj bildkarton. Skribu multnombro al Věra Dufková, Leninova 5, Šumperk, Ĉeĥoslovakio.

(daŭrigo de paĝo 32)

limoj de la individua tereno. Tio estus kontraŭdiro al via propagando, kiu estas ĝeneraligata kaj praktikata en la nomo de la grandaj komunmoj. Estus pli bone se al la kampanjoj favoraj al la landoj viaopinie subtenendaj, vi ne donus absolutan kaj pretendeman karakteron. Nur en la kadro de vera amo, de nia preĝado kaj pro kompato ni povos ĉirkaŭpreni la tutan homaron kiu ne posedas la nemankipovajon.

Ne bagateligante ĉion bonan kaj noblan faratan de multaj inter vi kaj ni, tamen estas utile serioze pripensi ke ni devas esti realismemaj, respektplenaj kaj humilaj.

(La artikolo aperis en la nederlanda lingvo en „Onze Wereld”, revuo de NOVIB — nederlanda organizaĵo por internacia helpo. Ĝin tradukis k-do J. Ph. Punt.)

## Japana opozicio enkondukus Esperanton en ĉiuj lernejoj

Viglan diskuton kaŭzis proponoj elmetitaj de la Socialista Partio, la plej forta opozicia partio de Japanujo. Ili unue aperis la 19an de novembro 1966 sub la titolo „Unua projekto de baza plano por reformo de la eduka sistemo”. Unuavice la proponoj antaŭvidas plilongigon de deviga edukado de sume 9 ĝis 14 jaroj. En tiu kadro aperas ankaŭ la deviga instruado de la Internacia Lingvo Esperanto al ĉiuj infanoj en la aĝogruppo de 8 ĝis 12 jaroj.

La instruadon de Esperanto la partio motivas per tri punktoj: (1) Esperanto helpas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj; (2) La lernado de Esperanto apud la gepatra lingvo helpas formi internacia-konsciajn japanojn; (3) Per la ekzemplo, ke ĉiuj japanoj lernas Esperanton, la partio farus pioniran laboron por monda paco kaj disvastigo de internacia lingvo. Estas rimarkinde, ke tiuj ĉi proponoj aperis nur kelkajn semajnojn post la oficiala transdono al Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko de internacia Propono pri solvo de la monda lingva problemo per Esperanto. El preskaŭ unu miliono da individuaj subskriboj al tiu Propono, pli ol 160.000 estis de japanoj.

La „Unua projekto” estos unu el la temoj de la partia kongreso, decembro 1967.

## U.N.-dokumentoj malkaŝas altan koston de multlingvaj konferencoj

Lastatempaj dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj permesas iom ekvidi, kiom kostas la uzado de pluraj lingvoj en la internacia vivo. Laŭ dok. A/C.6/L.600, ekzemple, internacia konferenco pri ĵuraj aspektoj de traktatoj (internaciaj kontraktoj) koston ĉ. 300.000 dolarojn jam nur por interpretado kaj tradukado. Laŭ dok. A/6343 la Somera Sesio de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. en 1965 kostis „preskaŭ duono de miliono da dolaroj nur por la tradukado”. Kompreneble, tiaj kosto, kiel ankaŭ la kosto de tajpado, kontrolado kaj multobligado de dokumentoj, estas rekte proporciaj al la nombro de lingvoj uzataj. Tradukado kaj interpretado en nur unu lingvon signifus drastan ŝparadon. Necesus nur, ke la delegitoj akiru pasivan scion de la koncerna lingvo. La plej justa kaj (pro ĝia facileco) plej ekonomia solvo estus la Internacia Lingvo Esperanto.

## Trijara Esp.-kurso en Hungara universitato

Trijara oficiala kurso de Esperanto komenciĝis en la katedro de ĝenerala lingvistiko de la Sciencuniversitato Loránd Eötvös en Budapeŝt. Dek tri 3a-jaraj studentoj elektis studi la Internacian Lingvon ses horojn semajne. Fininte la kurson sukcese, ĉiu ricevos diplomon kun la indiko, kiel tria fako, „mezlerneja instruisto de Esperanto, lingvo kaj literaturo”. Du aliaj hungaraj universitatoj oficiale enkondukis la Internacian Lingvon en la lastaj jaroj.

(Laŭ bulteno de Internacia Gazetara Servo - UEA.)

La 14an de aprilo s-ino Ramona van Dalsem (gramofondisko „La Felico”) gajnis la ĉefpremion en konkurso (nieuw talent) per sia kantado en Esperanto. La 18an de la sama monato KRO aŭdigis ŝian kontribuon en la programo Pizzicato.

## Verkoj de D-ro Zamenhof

Fundamenta Krestomatio . . . f 11,25  
Fundamento de Esperanto „ 12,80  
Lingvaj Respondoj bind. „ 7,50  
broŝ. „ 5,75  
Esperanto Proverbaro . . . . „ 5,70  
Leteroj de D-ro Zamenhof I „ 10,65  
Leteroj de D-ro Zamenhof II „ 10,65

Libro-Servo FLE. Marnixstraat 57,  
Haarlem, ĝirkonto 111278, telefono  
65417.

## SAT-Amikaro kongresis en Bruselo

Dum pasko pasinta okazis la kongreso de nia fratorganizo en la regiono de la franca lingvo, en Bruselo. Laŭ propono en lasta kunsido de LEA-komitato en Swanwick, reprezentantoj de aliaj LEA-oj estis invititaj. Tiel doniĝis internacia sfero al la kongreso. Por Britio ĉeestis k-do Arthur Prent, por Nederlando F. B. E. ten Hagen, por Germanio Pillekamp kaj por Svedio Ullstrom.

La naturamika domo Fraternité, tuj proksime de la suda stacidomo en Bruselo, estis la loko kien celis la kongresanoj. OKK viglis, oni revidis multajn malnovajn konatojn kaj ekkonis novajn. Tagmeze okazis ekzamenoj, kaj promenadoj sub gvido de Bruselanoj.

Dimanĉmatene okazis la unua labor-kunsido en Centre Intellectuel en Anderlecht. La skabeno por instruado de tiu komunumo salutis la kongreson kaj esprimis simpatian. La invititaj gastoj eksterlandaj alparolis la multnombrian publikon kaj dankis SAT-amikaron pro la invito. Responde al unu el la gastoj la sekretario de SAT-amikaro respondis ke la regula kresko de la membronombro ne estas miraklo, sed la rezulto de multaj sindone agantaj membroj.

Traktado de jarraportoj, fotado, bankedo, vizito al Erasmo-muzeo, grandparte plenis la tagon. Vespere estis vizito al la iluminita Granda Placo, pri kiu la Bruselanoj prave fieras.

Lunde estis daŭrigo de la laboro, kaj loterio por sendi komencanton al SAT-kongreso. Ornamis la laboron tri prelegoj kaj amuza vespero. La oficiala parto finiĝis, la plimulto iris hejmen.

Marde okazis aŭtobusekskurso tra Bruselo, vizito al la Afriko-muzeo en Fervuren (ne forgesu la krokodilojn!), promeno tra arbaro, tagmanĝo en naturamika domo, ktp.

La lastaj aranĝoj ebligis personan kontakton kun k-do Grandière, la sekretario de SAT-amikaro, kiu komparis la taktikon de la diversaj LEA-oj, por serĉi la plej bonan labormanieron. Kun ĝojo memoras la kongreson

F. B. E. ten Hagen

## Jarkolektoj LE kaj Sennaciulo akireblaj

K-dino M. v. Gink, Ploegstraat 19, Schiedam, povas sendi kontraŭ repago de kosto la jenajn jarkolektojn: LE 1960, '61, '63, '64, '65, '66 kaj Sennaciulo 1960, '61, '62, '65 kaj '66.

Interesiĝantoj bonvolu kontakti ŝin.

AMSTERDAM-2  
Veeteeltstraat 40 hs.

**J. W. Minke †**

*J. W. Minke, la gvidanto  
Tra l' arbar' de gramatik',  
Vera majstro en aplik'  
De la lingvo Esperanto.*

*Laŭnatura instruanto  
Sur la bazo de logik'.*

*J. W. Minke, la gvidanto  
Tra l' arbar' de gramatik'.*

*En la klubo prezidanto  
Elokventa retorik',  
Kaj de ĉiu la amik'  
Sur teren' de Esperanto.*

*J. W. Minke, la gvidanto.*

A.K.

HAARLEM  
Neptunusstraat 39

La 25an de majo ni kune preparos gazeton. La ĉeestantaro estos dividita en grupetoj, kiuj verkos artikolon ekzemple pri eksterlando, modo, sporto, ktp. Poste ni kune pridiskutos la artikolojn.

La 10an de junio ni promenos en Elswoud kaj trinkos teon en „Kraantjelek". Aŭto-buslinio 4 ĝis Ramplaan, sekvu Elswoudlaan ĝis dekstre vi vidos pordegon. Tie ni kunvenos je la dua.

Ĉiun merkredvesperon en junio ĉiu estos bonvena ĉe la sekretariino por konversacii en- aŭ eksterdomo.

J. J. Schouten, sekr-ino

**El la distriktoj** ★

GELDERLAND  
Havikstraat 5, Arnhem

Denove ni atentigas... kaj invitas vin por nia 'familia tago' en la feriejo 'Het Lierderholt' en Beekbergen, je la 21a de majo 1967. La adreso estas Spoekweg 49 kaj laejo estas atingebla el la direktoj Apeldoorn aŭ Arnhem per VAD-aŭtobuso (forlasu la buson ĉe haltejo 'Stoppelberg'). 'Het Lierderholt' disponas i.a. pri ludogardeno, do ankaŭ por viaj infanoj povas esti agrabla tago en belega ĉirkaŭaĵo!

De plenkreskuloj ni petos la malgrandan sumon de f 0,50; infanoj povas partopreni senpage.

Ĝis revido je la 21a de majo en Beekbergen.

Ad Otten, sekretario

**Faulhaber-fondaĵo**

Dua prezidanto nun estas k-do Aarse, ĉar k-do Faulhaber ekzigis el tiu funkcio, sed restas honora estrarano.

La semajnfino ĉijare okazos en novembro. La programo estos interesa; denove estos Parizano inter la prelegantoj. Precizaj informoj en la sekvonta LE.

Ni ricevis mondonacojn de:

k-do Saaltink, Arnhem ..... f 2,50

k-do P. G. Heinhuis, Wormerveer „ 5,—

k-do W. P. Siglé, Amsterdam ..... „ 7,—

Al ĉiuj nian koran dankon!

Tiuj, kiuj intencas viziti la kongreson en Malmö estas invitataj ĉeesti la junularan forumon. La proponita temo estas: „Ion pri Edukado".

Ankaŭ tiuj, kiuj ne povos viziti la kongreson, povas diri sian opinion pri la temo kaj sendi sian ideon al la Redakcio de LJP ĉe k-do C. Baude, 47 Beauville, Francio.

Samtempe mi informas vin, ke mi ricevis de k-dino C. Lindkvist, Rabygatan 30, Malmö, Svedio jenajn sciigojn.

Kiel vi jam scias la junulara postkongreso okazos en Råå, malgranda loko en la najbareco de Hälsingborg ĉe la bela markolo Öresund.

Ili tie luis tendumejon kaj la kostoj por tendo por nokto estas po sv.kr. 4.- kaj por persono po sv.kr. 0,50. Tiuj, kiuj posedas tendon kaj venas aŭtomobile estas petataj kunporti la sian ankaŭ aermatracoj estas bonvenaj.

Varmajn manĝojn ni povas uzi en la restoracio sur la kampadejo kaj ili kostas proksimume po sv.kr. 6,—. La buterpanmanĝojn ni povas mem prepari, do tio verŝajne ne kostas tro.

Vi estas devigataj kunporti aŭ dormsakon aŭ littukojn.

Espereble ĝis en la kongreso!

Corrie Kooij

**TANEF**

Ĉu vi ŝatas legi pri la Katofesto en Iper (Flandrio), pri la Israelaj popoldancoj, pri la montodomo „Esperanto" en Bulgario, pri vojaĝo al Szeged (Hungario), pri naturamikaj domoj en Aŭstrio, pri ĉiaraĵaj esperantistaj renkontiĝoj kaj pri multaj aliaj sciindaĵoj?

Tiuokaze vi tuj mendu la revuon de la esperantistaj naturamikoj „La Migranto"-n. En la ĵus aperinta numero 32 vi eĉ trovos esperantigitan kanton „Certe iam venkos ni" (We shall overcome)!

Abonu por 1967 per transskribo de f 3,60 sur ĝirkonton 39743 de G. van der Horst, Tesselschadelaan 8, Hago-14 (tel. 651745). Por tiu ĉi sumo vi ricevos 4 trimonatajn 32-paĝajn ilustritajn numerojn kaj vi subtenos samtempe la laboron de la TANEF-aktivuloj, kiuj i.a. varbas por Esperanto inter la anoj de la internacia turista asocio „La Naturamikoj".

**Filmistoj kaj Esperanto!**

Ĉe Studio de Belartaj Filmoj en Wrocław fondiĝis Rondo de Pola Esperanto-Asocio al kiu aliĝis 96 personoj, laborantoj en la Studio.

Krom popularigo de la internacia lingvo en filma kaj teatra medioj, la Rondo planas prilabori filmon pri Jardudeko de la Esperanto-Movado en Malsupra Silezio.

Membroj de la Rondo volonte ekligos korespondan kontakton kun filmistoj el la tuta mondo. Adreso estas: PEA, Rondo ĉe Studio de Belartaj Filmoj, Wrocław, str. Wystawowa Nr. 1, Pollando.

*Pro ne atenta korektado de la „La Majstro Vivas!", poemo publikigita en la aprila numero de LE, je nia granda bedaŭro en ĝi aperis pluraj eraroj kontraŭ la gramatikaj reguloj. La redaktorino petas pro tio vian pardonon.*

por la 40-a kongreso de SAT, 29/7-5/8 1967 en Malmö, Svedio.

Sabate 29/7 19 h. Interfratiĝa vespero en la kongresejo. Popola Domo en Limhamn.

Dimanĉe 30/7 10.00-12.00 h. Solena malfermo en la Urba Domo.

Loko: La granda Placo (Stortorget). Poste komuna fotografado.

Posttagmeze grupaj promenadoj, laŭ deziroj.

Fakkunsidoj.

Prelego pri la Nordkaloto, „La tegmento de Eŭropo".

Lunde 31/7 09.00 h. Unua laborkunsido. Poste: Vizitoj, urba rondveturo. Vespere frakcikunvenoj. Sindikata forumo.

Marde 1/8 09.00 Dua laborkunsido. 13.00 Duontaga ekskurso al Frostavallen.

Vespere: Laborista Universitato. „Aktiva kontraŭalkohola politiko". Diskuto.

Merkrede 2/8 09.00. Tria laborkunsido. (Eventuale) Frakciaj kaj fakaj kunvenoj.

Vizitoj. Urbdoma akcepto de la kongresanoj.

20.00. Kultura vespero en la Urbdomo.

Ĵaŭde 3/8. Tuttaga ekskurso. Tra Skanio al la Orienta Marbordo.

Vespere Junulara Forumo.

Vendrede 4/8 09.00. Forumo. Vespere. Adiaŭaj aranĝoj.

Rimarku! La kongreso okazos en la Popola Domo en Limhamn (Folkets Hus), urboparto de Malmö, facile atingebla per la tramo numero 4.

La prezo por la tuttaga ekskurso estos 25 sv.kronoj, en la prezo estas enkalkulita lunĉpakaĵo kaj tagmanĝo.

La prezo por la duontaga ekskurso estos 7 sv.kronoj.

Bonvolu atenti! Ni admonas ĉiujn partoprenantojn venontaj fervoje, kiom eble plej frue anoci sin ĉe OKK ĉar ni devas sendi rabatajn atestojn. La rabato kredeble ne validas tra Germanio.

Unulitaj ĉambroj ne plu haveblaj.

OKK de SAT.

**S.A.T.-rondoj** ★

AMSTERDAM  
Curiestraat 22 hs

Verŝajne superflue ni atentigas vin, ke la 30an de arpilo okazis la lasta kunveno de nia rondo. La rakonto de fraŭlino E. Wekker pri ŝia vojaĝo al Surinamo altiris multajn interesigaĵojn. Komprenneble, se ni memoras ŝian vojaĝon al Tokio! Multe ni dankas ŝin kaj ankoraŭfoje ĉiujn aliajn, kiuj kunlaboris en niaj sufiĉe bone vizititaj SAT-matenoj. Dank' al ili ni povas rerigardi allogan kaj instruan vintran programon. Cetere ni volas danki ĉiujn, kiuj iel ajn kontribuis en la glata funkciado de niaj matenoj, ekz. kiuj prizorgis la kafon ktp.

Ni deziras al vi agrablan ferion, kiu donu la bezonatajn fortojn por vi persone en via ĉiutaga vivo kaj por nia SAT-rondo en la venonta vintra programo 1967-1968!

Ĝis la revido en oktobro 1967!

Nome de la estraro,

Dick Veen, sekr-io.

